Invitilo al

Naskiĝtaga Festo de Esperanto en Berlino la 2an de Aŭgusto 2008

La lingvokreinto Ludoviko Lazaro Zamenhof
kaj lia Esperanto en hodiaŭa mondo

Ni festos 100 jarojn post publika elpaŝo de Zamenhof en Berlino kaj 1 jaro antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko okaze de lia 150a naskiĝjaro.



Programo:

14.00 h Akcepto de la partoprenantoj en Esperanto-Kulturdomo Einbecker Straße 36 en Berlin – Lichtenberg (Stacidomo Berlin-Lichtenberg, elirejo Einbecker Straße)

14.15 h Esperanto-koncerto en parko apud Esperanto-Kulturdomo, por kiu ni proponos la nomon „Zamenhofpark“ kun Alexander Danko kaj aliaj muzikantoj

15.00 h Tramveturado per historia tramo tra Orienta Berlino laŭ evento en 1908 de Lichtenberg (Siegfriedstraße, angulo Frankfurter Allee) al Hackescher Markt kun klarigoj pri Berlinaj Esperanto-lokoj en historio kaj nuntempo kaj de okazaĵoj dum la Postkongreso en Berlino 23an – 25an de Aŭgusto 1908

16.00 h **Aranĝo en Pola Instituto** en Berlin, Burgstraße 27 (S-Bahn-stacio Hackescher Markt) kun prenzentado de la libro „La Zamenhofstrato“ fare de la aŭtoro Roman Dobrzyński (nask. 1937, pola ĵurnalisto kaj televida filmisto) kaj de la germana tradukinto Michael Scherm (nask. 1945, germana instruisto) kaj prezentado de Bjalistoko kiel urbo de la sekvonta jubilea UK (150a naskiĝtagrevena jaro de Zamenhof), poste leĝera interparolado

19a h Fino de la aranĝo en Pola Instituto
Por interesuloj ni mendis tablojn por vespermanĝi kaj babili poste en restoracio “Mansy”, Oranienburger Straße 14.

„La Zamenhofstrato“ , aperigita en pola lingvo en 2003, poste tradukita en 20 aliajn lingvojn peras al ni aŭtentikan enrigardon en la vivon kaj sorton de familio Zamenhof, la evoluon de la internacia Esperanto-movado kaj la sorton de la ideoj de Zamenhof en la hodiaŭa mondo laŭ la vidpunkto de la nepo de la kreinto de Esperanto Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof.



Partoprenkotizo: 14 € pagendaj al la konto de Esperanto-Ligo Berlin n-ro 70550102 ĉe Postbank Berlin, banka kodo 10010010

Partoprenantoj bonvolu anonci sin ĝis la 15a de Julio 2008 ĉe “Esperanto-Ligo Berlin“, Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, tel. 030-55 15 70 16, poŝtel. 017749 190 19 fakso: 55 15 70 17, retpoŝto: peter.kuehnel@esperanto.de.